INSTRUKCIOJ POR LA AŬTOROJ DE KAEST 2008

LA TEKSTO

La titolo de la prelego/teksto
ne estu tro longa, ĝi havu maksimume 10 vortojn. Oni **ne uzu** en la titolo **mallongigojn** (escepto estas la mallongigoj „konvencie“ vaste uzataj).

La nomo(j) de la aŭtoro(j)
estu prezentita(j) jene: **Plena(j)**, t.e. nemallongigita(j), **persona(j) nomo(j)** [resp. antaŭnomo(j)] kaj **majuskle plena familia nomo**. Post la nomo(j) estu indikita, en la rondaj krampoj, la ŝtato de kiu la aŭtoro(j) devenas.

La strukturon de la tekso (kaj prelego)
oni lasas plejparte al la volo de la aŭtoroj. Tamen la prelegontoj strebu pri la maksimuma kompreneblec o de la tekstoj kaj de la prelegoj. **Rekomendata** estas **la sĥemo: enkonduko en la problemon – ekspliko + diskuto de la problemo – konkludo(j).**

Neologimoj aŭ rare renkoteblaj simboloj
devas esti difinitaj en klarigoj fine de la teksto aŭ „sublinie“ , ĉe la piedo, de la koncerna paĝo. Kio temas pri neologismoj, oni ne uzu la neologismojn superfluajn, t.e. por la nocioj kiuj jam havas klaran, ĝustan kaj precizan terminon. Por eviti miskomprenojn aŭ dubojn ni difinas **neologismo**n jene: temas pri termino (vorto), kiu **ne estas trovebla en PIV 2005**.

La amplekso
de la teksto **ne superu 10 paĝojn** de la manuskripto, se ne estas antaŭe interkonsentita kun la redaktonto io alia. En ĉi tiun amplekson estas ankaŭ kalkulitaj resumoj de la prelego, klarigoj, bildoj, tabeloj, priskribo de la aŭtora kariero kaj literaturaj referencoj! Sub la termino „1 paĝo de manuskripto“ oni komprenas la paperfolion A4 kun la tajpaĵo nur sur unu flanko. **Unu manuskripta paĝo** ne enhavu pli ol **35 liniojn** kaj **unu linio** havu maksimume **60 klavospacojn**.

La **resumo ne transpaŝu 50 vortojn**. La priskribo de la **aŭtora kariero** ankaŭ **ne havu pli ol 50 vortojn**. (Temas pri la kariero faka kaj/aŭ Esperanta).

La plej rekomendinda estas sendo de la teksto per elektronika poŝto, eventuale oni povas ĝin transdoni sur disketo aŭ KD, en la formato ***Word*** por ***MS Windows 98*** (aŭ pli progresinta). Uzu **x-konvencion** por la supersignitaj literoj, precipe se vi intencas sendi la tekston retpoŝte (per elektronika poŝto).

La limdato por la transdono de la tekstoj

La aŭtoroj estas petataj **transdoni la tekstojn** de la prelegoj **surloke** dum la konferenco sur disketo aŭ KD (se ili ne estis senditaj retpoŝte). Se la aŭtoro volos fari ŝanĝojn aŭ kompletigojn (baze de la diskuto dum la konferenco) estos la tekstoj akceptataj post la konferenco, sed **plej malfrue 2 semajnoj post la fino de la entrepreno**. La menciita dato estas maksimuma limo. Oni ne sendos leterojn por rememorigi la limdaton. En la prelegokolekton estos envicigitaj nur tiuj tekstoj, kiuj venos ĝustatempe.

BILDOJ, GRAFIKAĴOJ

Oni zorgu pri la **alta kvalito** de bildoj, fotoj, grafikaĵoj kaj aliaj ilustraĵoj. Oni liveru originalajn ilustraĵojn (ne kopiojn aŭ „kopiojn de kopioj“), sufiĉe kontrastajn. Nekvalitaj ilustraĵoj ne estos akceptataj!

AŬTORAJ RAJTOJ = KOPIRAJTO [©]

Estas necese severe zorgi pri la aŭtoraj rajtoj (= kopirajto): Se la aŭtoro de la teksto ne uzas en la verko siajn proprajn bildojn aŭ grafikaĵojn, sed tiujn de aliaj aŭtoroj, li devas havi **skriban permeson de la koncernaj aŭtoroj** por la publikigo. La samo validas, se oni uzas (transprenas) partojn de tekstoj el aliaj verkoj.

Ĝenerale estas rekomendata uzi siajn proprajn bildojn, grafikaĵojn kaj ne tro abunde uzi longajn „citaĵojn“ el aliaj verkoj.

LA PRELEGOJ

La daŭro de unuoapaj prelegoj ne superu 30 minutojn, kiuj inkluzivas ankaŭ eventualan diskuton (do la prelego mem estu adekvate malpli longa!).

Se estas necesaj por prelegi **teĥnikaj iloj** (projekciiloj, videoaparatoj k.s.) la aŭtoroj sufiĉe frue mendu, resp. pridiskutu la aferon, ĉe la organizantoj.

REFERENCOJ = PREZENTADO DE LA LITERATURAJ FONTOJ

Por unuecigi la manieron de la prezentado de la literaturaj fontoj estas rekomendinda formo laŭ **ISO 690**. Ekzemploj de la plej oftaj referencmanieroj laŭ ĉi tiu normo estas en la aparta aldonaĵo de ĉi tiuj Instrukcioj por la aŭtoroj. Ĉiukaze la **referencoj estu** koncizaj, tamen **sufiĉe precizaj**, ke **oni povu facile trovi la originalan fonton.**

UNUOJ

En la tekstoj kaj prelegoj **estu nepre uzataj**, almenaŭ unualoke, la **unuoj laŭ la Internacia Mezursistemo (SI) de la Unuoj**. En la aparta aldonaĵo de ĉi tiuj Instrukcioj por la aŭtoroj estas prezentitaj la fundamentaj unuoj kaj elekto de la plej gravaj derivitaj unuoj.

BIOGRAFIO DE LA AŬTORO(J)

Biografiaj indikoj pri la aŭtoro(j), t.e. konciza priskribo de la faka kaj/aŭ Esperanta kariero ne estas, kompreneble, devigaj. Tamen estas nepre rekomendinde, ke la **aŭtoroj donu koncizajn indikojn pri siaj persono** kaj eventuala kontakteblo.